26

Libraro Pacifisma, N° 13
ELDONATA DE LA SOCIETO « PACIFISTO »

OTTO UMFRID

# Formulo pri Malarmo

## precipe rilate al la Brita propono pri malarmo

El germana lingvo tradukis

P. CHRISTALLER

☆

PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, Rue Lacépède, 33

1908
Prezo : 0 fr. 25

# Ekstraktoj el la Regularo de la Societo "Pacifisto"

Artikolo 1-a. — La Internacia Societo Esperantista por la Paco « *Pacifisto* » celas :

1-e. Propagandi la ideon solvi la malkonsentojn internaciajn per interkonsento aŭ juĝo, kaj laboradi por la reciproka alproksimiĝo de la popoloj, por ke la sistemo de organizita paco anstataŭu la sistemon de paco kun armado.

2-e. Plifaciligi la taskon de la aliaj Societoj por la Paco, propagandante inter ili la scion kaj uzadon de Esperanto.

Ĝi malpermesas al si ĉian alian agadon, kaj nome ĉian disputadon aŭ propagandon rilatan al la interna politiko de la regnoj kaj al la religiaj demandoj.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

4. — Ĉiu persono deziranta kunlabori por la tasko difinita de la unua artikolo povas partopreni en la Societo.

La peton por akcepto oni devas sendi al la Centra Komitato aŭ, se grupo ekzistas en la loko, al la Komitato de tiu grupo. Tiu Komitato decidas pri la akcepto, kiu estas publikigata en la revuo.

Ĉiu societano kondamnita je malgloriga puno estas konsiderata kiel eksiĝinta. Ĉiu membro, kiu pruvite faris malbonan agon, povas esti proklamata eksiĝinta, de la komitato mem, kiu lin alprenis, sed nur estinte devigata doni siajn buŝajn aŭ skribajn klarigojn.

6. — Ĉiu societano pagas ĉiujare kotizon po 5 frankoj, kiu rajtigas lin partopreni en la ĝeneralaj kunvenoj, ricevi senpage la revuon, ricevi senpage aŭ rabate la aliajn societajn eldonojn, kaj partopreni en ĉiuj aliaj utiloj donataj al la societanoj (kiel, ekzemple, la rabataj anoncoj en la revuo).

7. — Kiel escepto de la artikolo 6-a, kelkaj personoj, ĝis la nombro 5, povas kolektiĝi por pagi *opan kotizon*.

Tiu kotizo konsistas el monsumo da 5 frankoj, kun aldono po 50 centimoj de ĉiu partoprenanto. Ĝi rajtigas ricevi nur unu ekzempleron de la revuo kaj de la senpagaj eldonoj, sed la partoprenantoj havas pri ĉiu alia afero la saman rajton kiel ĉiuj aliaj societanoj.

Por eviti senutilajn korespondadon kaj elspezojn, la persono, al kiu estas adresata la revuo, estas responda, kontraŭ la Societo, pri la kotizoj de siaj kunmembroj.

8. — *Membroj propaganduloj* estas la personoj, kiuj pagas ĉiujaran kotizon da 10 frankoj.

*Membroj donaculoj* estas la personoj, kiuj pagas ĉiujaran kotizon da 25 frankoj.

Oni povas anstataŭigi sian kotizon per unu sola pago dudekobla, kiu rajtigas por la jenaj titoloj : pro pago da 100 frankoj, *ĉiama membro* — da 200 frankoj, *ĉiama propagandulo* — da 500 frankoj, *ĉiama donaculo*.

9. — La titolon *membro honora* povas doni la Centra Komitato aŭ la Generala Kunveno al personoj, kiuj faris grandan servon al la Societo. De tiuj membroj nenia kotizo estas postulebla.

10. — La Societo petadas kaj akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj povas helpi al ĝia agado.

11. — La enpreso de la kotizoj kaj donacoj en la plej proksima numero de la revuo taŭgas kiel kvitanco.

12. — La societa budĝetperiodo daŭras de la unua de januaro ĝis la tridek unua de decembro.

13. — La kotizoj de novaj membroj aliĝintaj antaŭ la 30-a de septembro koncernas la tiaman budĝetperiodon. Post tiu dato, ili taŭgas por la sekvanta budĝetperiodo, kvankam ili rajtigas ricevi ĉiujn eldonojn aperintajn post la momento de l'aliĝo.

14. — Ĉia kotizo ne pagita dum la unua jarkvarono estas enspezata per la poŝto, kaj la prokrastinto devas pagi la poŝtajn kostojn.

Se tiu ĉi ne pagis, la Centra aŭ Loka komitato povas proklami lin eksiĝinto.

Libraro Pacifisma, N° 13
ELDONATA DE LA SOCIETO « PACIFISTO »

OTTO UMFRID

# Formulo pri Malarmo

## precipe rilate al la Brita propono pri malarmo

El germana lingvo tradukis

P. CHRISTALLER

☆

PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, Rue Lacépède, 33

1908
Prezo : 0 fr. 25

702091-B

*De tiu ĉi libro oni presis dek numerigitajn ekzemplerojn sur luksa papero.*

# FORMULO PRI MALARMO

**precipe rilate al la Brita propono pri malarmo** [1].

---

La unua Haga Konferenco ne atingis kontentigan rezulton pri malarmo. Certe oni konsentis, ke la popoloj sentas kiel pezan ŝarĝon la trograndigitan armadon kaj ke oni devos serĉi rimedojn por malpezigi tiun ŝarĝon. Nur — oni diras — ne estas trovita ĝis nun la ĝusta formulo pri malarmo. Tiele oni prokrastis ĝis estonta konsiliĝo ĉi tiun formulon. La dua Haga Konferenco akceptu do plenespere la taskon, kaj ĝin solvu kontentige. Nuntempaj signoj rimarkigas ke Eŭropo celas unuiĝon. Ĉio celas organizon de nia kontinento. La Eŭropaj regnoj volas elkristaliĝi el la ĥaoso de l'anarĥio. La historio de la pasintaj tridek jaroj montras, ke rilate pliarmo ili ne povas preteriri unu la alian, eĉ ne malaperigi la diferencojn jam de longe ekzistantajn. Ĉar oni ja scias, kiam ekzemple Franca militiŝipo konstruiĝis en Cherbourg, tiam samtempe tia eliras la konstruejon de Vilhelmshafen kaj, kiel eble, la saman tagon oni finpreparis en la Portsmouth-a

---

(1) Oni scias ke, konforme al niaj antaŭvidoj, la Haga Konferenco ne solvis, eĉ ne faris la plej malgrandan provon solvi la demandon pri haltigo de l'armadoj, kiu restas do en la tagordo kiel ĉefa priokupo de ĉiu bona regnano. Ni daŭrigas do la eldonadon de la plej interesaj studoj verkitaj pri tiu temo, atentigante tamen pri la rezervoj kiujn ni faris, rilate al la ideoj de S-ro Umfrid, en nia januara numero, sur paĝo 18-a.

haveno du tiajn « mastodontojn », kiel ilin nomis barono d'Estournelles.

Por eviti malkomprenon, mi antaŭ ĉio diras la jenon : Laŭ mia opinio oni nun ne povas ankoraŭ komenci malarmon. Unue ni bezonas kontrakton interregnan, per kiu la regnoj reciproke garantios siajn nunajn teritoriojn kaj difinos la ekstereŭropajn interesosferojn ; poste la malarmo sekvos senpere.

Sed *haltigo* de armado jam nun estas ebla. Jam la iama Prusa militministro Von Gossler kredis, ke oni povus senmovigi la konatan, ĉiam pli eniĝantan ŝraŭbon, se nur la regnoj garantius, ke dum difinita templimo ili ne provos solvi per glavo la ekzistantajn demandojn. Ĉie konata estas la cirkulero, per kiu la caro kunvokis la unuan Hagan Konferencon, tiel same lia klasika priskribo de l'febro armada, kiu kaptis la naciojn. Kiel tiam la plej granda kontinenta potenco agis por la ideo de malarmado kaj fratiĝo de popoloj, tiel nun la plej granda mara potenco aŭdigas la vokon pri haltigo de l'armado. Kion diros la ceteraj regnoj pri tiu ĉi propono, jam la duan fojon prezentita al ili, kaj subtenata per tiel granda aŭtoritato ? Fakto estas, ke bonvole jam nun oni povus atingi la cititan haltigon. Certe la kielo havas siajn malfacilaĵojn. Kiam oni serĉegas elmontri la diferencojn kiuj ekzistas inter la nacioj, tiam oni riskas ne trovi ian finon. Estas ja malfacile kompari ekzemple la Rusajn kaj Germanajn soldatojn laŭ ilia milita valoro, aŭ Francajn kaj Germanajn kanonojn, aŭ Anglajn kaj Germanajn ŝiptipojn. Eĉ la ideo kalkuli laŭ « batalunuoj » (t. e. laŭ nombro da ŝipoj), kiel faras la asocio nomata « Germana Ŝipara Unuiĝo » estas kontraŭdirebla. Kiel, ekzemple, oni povus kompari la 29 pli maljunajn Britajn kirasŝipojn de 1862-86-aj jaroj kun la 21 germanaj batalŝipoj, kies plej maljuna estas el la 1877-a

jaro? Aŭ kiel oni povas taksi la valoron de la jaĥtoj aŭ de la apenaŭ provitaj submaraj boatoj? Ni konsideru plie la diferencon de la popola klereco, de la amplekso de l'fervojaj retoj, de la biena valoro, de la scienca progreso, de la regnaj ŝuldoj; tiam oni tuj komprenos, ke klera popolo estas pli armita ol duonklera, kaj ke tial la regnestro de l'malpli klera popolo, intencante egaligi la diferencon, bezonus pli da soldatoj ol la registaro de la klera nacio. Aŭ, ni supozu, ke ekzemple Anglujo havus industrian krizon dum floradas la Germana industrio, tiam kompreneble Germanujo pri armadaj demandoj havus pli oportunan situacion ol Anglujo. Plie, kiam ĉe popolo, kiel ĉe la Franca, ne progresadas la popolana nombro, dum la Germana popolo rapide plimultiĝas, tiam nature la Germanoj povos pli facile ol la Francoj konservi sian armon. Ĉu oni povos flanklasi tiajn diferencojn, en internacia kontrakto pri armado? Ili nuntempe fakte jam efikis: ĉar ĉiu popolo, kiu iom malfacile progresis, malantaŭiĝis ankaŭ rilate al armeo kaj ŝiparo. Sed, ĝis nun, ĉiam la naciaj enspezoj estis la unueca mezurilo, laŭ kiu oni pli malpli povis plimultigi la armadon. Se do oni forlasus estonte pluan pliigon de armado, tiam certe oni ankaŭ forlasus la profiton, kiun donas por la batalforto iu ajn plimultiĝo de la enspezoj aŭ la pli rapida alkresko de l'popolanaro. Sed tio ne domaĝus, kondiĉe ke la ceteraj regnoj ankaŭ ne pligrandiĝu sian potencon. La « ofero » kiun ekzemple la Germanoj farus, rezignante pri plua pligrandigo de sia batalforto, havus egaligon jam per tio, ke ankaŭ Rusujo, kiu ja pro sia rapida popolkreskado pli multe kapablas batale plifortigi sin, devus rezigni profiti sian tutan popolforton por armado.

La Angla propono pri haltigo de armado fakte nur estas la provo fiksi al maksimumo la armadan termometron

ĝis nun ĉiam leviĝintan kaj anstataŭigi la ĉiaman leviĝon per konstanteco. Laŭ tiu propono la regnoj eĉ ne devus rezigni pri finigo de armo jam komencita. La Germano ŝipkonstruo ekzemple estas leĝe decidita ĝis la 1917-a jaro. Kompreneble oni ne maldecidos tion, kio fariĝis leĝo. Sed oni ja povus destini tiun ĉi aŭ alian jaron, ekzemple la 1825-an, ke ĝi estu fina jaro, ĝis kiam ĉiuj regnoj devus fini tion, kion hodiaŭ ili intencas fari pri armo. Por tio oni devus fiksi maksimumon por ĉiu nacio, ekzemple : oni ne rajtus ĝis 1925-a elspezi ĉiujare pli da mono ol oni elspezis ekzemple en la normaljaro 1906. Postan plimonon oni ne rajtus parlamente postuli, novajn eltrovaĵojn pri detrua tekniko oni ne rajtus uzi. Al la Rusoj oni ja povus permesi elspezi jare tiom por ilia, dum la lasta milito preskaŭ tute detruita ŝiparo, kiom ili elspezis meze dum la lastaj dek jaroj antaŭ la milito. Post la fina jaro 1925-a oni ne rajtus konstrui novan militŝipon aŭ krei novajn kadrojn.

Tion pri la haltigo de armado. Regulan malarmon la Eŭropaj regnoj nur tiam povus komenci kiam ili ĉesos esti ĵaluzemaj konkurantoj, kiam ili komencos rigardi sin kiel partoprenantoj en unu firmo, kies nomo estus : Defendo por komuna kulturo.

Oni ne bezonas klarigi detale kiajn profitojn havas firmoj, antaŭe reciproke konkurintaj, kiam ili unuiĝas. Se la trustoj kaj sindikatoj ne estus profitegaj, tiam oni certe ne kreus ilin. Kiam du firmoj unuiĝas, oni ne nur ŝparas grandajn sumojn pro malbezono de kelke da ejoj kaj kelka personaro, sed oni devos malpli elspezi por reklamo, ĉar unu firmo ne plu bezonos antaŭkrii la alian kaj — jen la ĉefaĵo — oni laboros per pli oportunaj ŝancoj, oni ne devos plimalkare vendi ol la alia, kontraŭe oni povos fiksi belajn vendprezojn. Konatan ekzemplon montras la petrolsocietoj. Antaŭe ekzistis

ties du : la Rusa kaj la Amerika. Ili konkuris reciproke, malfaciligis sian prosperadon per ĉiama malpligrandigo de la vendprezoj; nun ili sindikatiĝis kaj la unuigita petrol-societo de l'mondo gajnas multe pli grandajn sumojn, tiu ĉi ega asocio havas la petrolan monopolon. Se ne ekzistus gaso kaj elektra lumo, la petrol-baronoj povus laŭvole fiksi la plej altajn prezojn por sia petrolo. Do, iliaj kondiĉoj de vivo estas tiel bonaj, kiel neniam antaŭe. La malamikeco, antaŭe reciproke sentita de ili, malaperis, ili nun salutas sin kiel societanoj; ili diris en sia rondo « Die Waffen nieder » (Forĵetu la batalilojn) !

Sed nun antaŭ ĉio mi devas kontraŭdiri eblan malkomprenon. Mi tute ne celas unuiĝon de ĉiuj regnoj en unikan regnegon, kiel oni unuigas firmojn. La regnoj devas, por tiel diri, eniri kartelon, en kiu al ĉiu estos garantiata ĝia posedaĵo, en kiu ĝi havos perspektivon al pligrandigo de ĝia potenco per rilate malplia peno. Ĉiu metaforo estas iom malpreciza, sed, bone elektita, ĝi ebligas klarigi aferon. La unuigitaj petrol-societoj havas la taskon provizi la homaron per petrolo. Por tio ili atendas profiton distribuotan, laŭ difinita maniero. La Eŭropaj regnoj havas la taskon defendi iliajn regatojn kontraŭ eksteraj danĝeroj, plivastigi en la mondo Eŭropan kulturon kaj profitigi al la tuta homaro la sendanĝerecon, kiun ili mem ĝuas. Pro tio, ili ricevos tiun profiton, ke la riĉaĵoj de l'mondo alvenos al ili, ke ilia potenco pligrandiĝos. Ju pli granda estos ilia asocio, ju pli malgrandaj estos la elspezoj necesaj por la konkurenco, des pli granda estos la profito.

Laŭ kiaj principoj nu oni devus aranĝi la societiĝo de la regnoj ? Oni devus difini, kiom da mono devas elspezi ĉiu regno por la komuna kvazaŭĝendarmaro, t. e. por armeo kaj ŝiparo por plej bone efiki la necesan defendon kontraŭ

eksteraj danĝeroj ? Oni respondos : ĝi devas partopreni por atingo de l'komuna celo laŭ sia povo. Ni ree komparu la petrolsocieton. Supozite ke iu elspezo, necesa por la komuna intereso ĉe la asociita Rusa-Amerika societo estas 100.000 markoj, kiom devos pagi la Rusa societo, kiom la Amerika ? Inter la jaroj 1881-a kaj 88-a oni produktis en Ameriko 15530 milion tonojn da petrolo, en Rusujo 5084 milion tonojn. En Ameriko oni profitis, per tiu oleokvanto, 83 milion funtojn sterlingajn, en Rusujo 27 milion da ili. Do la rilato inter la Rusa kaj Amerika produktaĵo estas 27 : 83. La citita elspezo da 100.000 markoj sekve estas dividota jene :

Ĉe 110 (27 + 83) milionoj da profito oni havas elspezon da 100.000 milionoj

Ĉe 1 miliono ..................... $\frac{100.000}{110}$ milionoj

Ĉe 27 milionoj (Rusa profito).... $\frac{100.000 \times 27}{110}$

Ĉe 83 milionoj (Amerika profito). $\frac{100.000 \times 83}{110}$

Sed kiel oni povos uzi tian kalkulon pri la regnoj ?

Germana kolonelo von Schwartzhoff diris ĉe la unua Haga konferenco, ke, ĉe kalkulo de armo, oni ne rajtus kalkuli nur la pafilojn, kanonojn kaj kirasŝipojn sed ankaŭ la fervojojn. Oni eĉ povus aldoni : oni devos ankaŭ konsideri la bienan valoron, la amplekson, la koloniojn, kaj precipe la nombron de popolanaro. Oni eĉ povus provi fiksi la klerecon au neklerecon de la popolanoj laŭ la nombro de neinstruitoj. Fine oni povus, por havi tute ĝustan komprenon de regna individueco, paroli pri landlimoj kaj demandi, ĉu regno kun longa landlimo, sidante inter « malbonaj najbaroj », ne devos elspezi pli grandajn sumojn por la tiel multe dezirata defendo,

ol regno kiel Anglujo, tute ĉirkaŭata de maro. Sed tiajn demandojn ĉi tie ni flanklasas principe; ili laŭvere estas kaŭzitaj per la malkonfido nuntempe reganta, kiu ja estas rajtigita dum la regnoj estas konkurantoj, kiu tamen estonte havos nenian rajton kiam la regnoj estos asociintoj.

Ni ja nun havas precizan mezurilon laŭ kiu ni povas juĝi la potencon de la fortfontoj ŝprucantaj interne de la regnoj. Tio estas la *nacia* enspezo. Certe oni devos subtrahi la ŝuldprocentojn kaj amortizojn pagotajn, kiam oni volas sciiĝi kiom fakte enspezas iu popolo. Sed poste la rezultato donos pli ĝustan aspekton ol la tiel nomata *regna* enspezo [1]. La nacia enspezo fakte montras pli precize la fontforton de iu popolo ol la regnaj enspezoj, ĉar iu regno ja povas per troa ŝraŭbado de la imposta ŝraubo malrajte impostigi sian popolon, dum alia eble ne sufiĉe profitas la povon ekzistantan. Laŭ tiuj ĉi antaŭrimarkoj ni ricevas la jenan tabelon :

Naciaj enspezoj de ses Eŭropaj ĉefregnoj post subtraho de ŝuldprocentoj kaj amortizoj :

Neta nacia enspezo

—

| | | | |
|---|---|---|---|
| Anglujo ....... | 1260 | milion funtoj | sterlingaj |
| Germanujo .... | 1052,5 | — | — |
| Francujo ...... | 995,5 | — | — |
| Rusujo ........ | 938,5 | — | — |
| Aŭstrio-Hung. . | 588,5 | — | — |
| Italujo......... | 339 | — | — |
| Sume... | 5174 | milion funtoj | sterlingaj |

(1) Se oni preferas konsideri la *regnan* enspezon, oni ja povas fari tion, oni tiam havos pli precizajn monsumojn por kalkulo.

*Ĉar la ĉefregnoj kune elspezas jare ĉirkaŭ 5500 milion frankojn por siaj kirasoj, tiu ĉi armada elspezo rilate al la nacia enspezo estus distribuota jene :*

Se ĉe 5174 milion funtoj sterlingaj estas pagataj 5500 milion frankoj, tiam ĉe 1 milion funt-sterlinga enspezo oni pagos $\frac{5500}{5174}$

Tiele devos pagi :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Anglujo ....... | $\frac{5500 \cdot 1260}{5174}$ | = 1339 | milion frankojn |
| Germanujo .... | $\frac{5500 \cdot 1052{,}5}{5174}$ | = 1119 | — |
| Francujo ...... | $\frac{5500 \cdot 995{,}5}{5174}$ | = 1058 | — |
| Rusujo ........ | $\frac{5500 \cdot 938{,}5}{5174}$ | = 997,6 | — |
| Aŭstrio-Hung.. | $\frac{5500 \cdot 588{,}5}{5174}$ | = 625,6 | — |
| Italujo ........ | $\frac{5500 \cdot 339}{5174}$ | = 360,4 | — |

Ni forlasas ĉi tie kompari ĉi tiujn normalnombrojn kun la faktaj elspezoj por armeo kaj ŝiparo.

Nun ni alfaru la ricevitajn proporci-nombrojn al la armea efektivo dum milito. Certe oni tie ĉi flanklasos Anglujon, ĉar ĝi celis per sia armado precipe sian ŝiparon, dum ĝia armeo en milita tempo apenaŭ superas 700 000 soldatojn kaj tial ne estas komparebla kun la kontinentaj

armeoj. Ni komparu do la 5 ceterajn ĉefregnojn. Ili kune havas militan potencon da ĉirkaŭ 17 000 000 soldatoj. Kiam ni subtrahas la nacian havaĵon de Anglujo, t. e. 1260 milion funtoj sterlingaj, tiam restas, por la du- kaj tri-aliancaj regnoj, nacia havaĵo da 3914 milion f. st.

Se nun oni povas starigi ĉe 3914 milion f. st. 17 000 000 militistojn, tiam ĉe 1 miliono oni starigos $\frac{17\,000\,000}{3914}$. Do, devus starigi :

| | | | militistojn |
|---|---|---|---|
| Germanujo, ĉe 1052,5 milion f. st., | $\frac{17\,000\,000 \,.\, 1052{,}5}{3914}$ | t. e. | 4,571,406 |
| Francujo, ĉe 995,5 milion f. st., | $\frac{17\,000\,000 \,.\, 995{,}5}{3914}$ | t. e. | 4,323,831 |
| Rusujo, ĉe 938,5 milion f. st., | $\frac{17\,000\,000 \,.\, 938{,}5}{3914}$ | t. e. | 4,076,292 |
| Aŭstrujo, ĉe 588,5 milion f. st., | $\frac{17\,000\,000 \,.\, 588{,}5}{3914}$ | t. e. | 2,556,079 |
| Italujo, ĉe 339 milion f. st., | $\frac{17\,000\,000 \,.\, 339}{3914}$ | t. e. | 1,472,405 |

Denove ni forlasas kompari la rezulton de nia kalkulo kun la faktaj militfortoj de la Eŭropaj armeegoj. Nia kalkulo montras preskaŭ la faktajn nombrojn. Sufiĉas por ni la jena konsidero : Se la supre citita kontrakto estus farita inter la du-kaj tri-alianco, tiam neniu regno serĉus superi alian pri armado. Kontraŭe, kelkaj regnoj, nun ĝemantaj pro la peza armo, dirus, ke ili estas tro ŝarĝitaj por la komuna defendo, tio estas, ili dezirus esti malŝarĝataj. Sed tiun ĉi deziron oni

nur povus proporcie plenumi. Ni imagu : se Italujo povus elspezi nur duonon de la ĝis nunaj armadelspezoj, tiam rezultus por la kvin laste cititaj regnoj jena proporcio :

*Pagos por armeo kaj ŝiparo :*

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| *Germanujo* | *anstataŭ* | 1119 | *nur* | 559,5 | milion frankojn |
| *Francujo* | — | 1058 | — | 529 | — |
| *Rusujo* | — | 997,6 | — | 498,5 | — |
| *Aŭstr.-Hung.* | — | 625 | — | 312,5 | — |
| *Italujo* | — | 360 | — | 180 | — |

Tion aplikante al la militaj armeoj,

*starigus estonte :*

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| *Rusujo* | *anstataŭ* | 4,000,000 | nur | 2,000,000 | militistojn |
| *Germanujo* | — | 4,500,000 | — | 2,250,000 | — |
| *Francujo* | — | 4,300,000 | — | 2,150,000 | — |
| *Aŭstr.-Hung.* | — | 2,500,000 | — | 1,250,000 | — |
| *Italujo* | — | 1,500,000 | — | 750,000 | — |

**Per tio eble estas montrita vojo irebla al malarmo.**

Se la regnoj ne baldaŭ kontraktos tiel aŭ similamaniere, tiam iliaj ekonomiaj malfacilaĵoj fine fariĝos netolereblaj. Sed tuj post konsento pri tia propono, ili plenspiros, kvazaŭ liberigitaj de inkubo, ili alpaŝos la venontecon ĝojplenaj kaj sen premantaj zorgoj.

# ALDONO

**Tabelo pri la elspezoj neproduktaj de la ses regnoj Germanujo, Aŭstrio-Hungarujo, Italujo, Francujo, Rusujo, Anglujo kaj pri la ŝarĝo, kiun ili pezigas sur la unuopan regnanon laŭ la plej novaj dokumentoj.** (Vidu *Gotha'scher Hofkalender* 1906 kaj John Keltie, *the Statesman's Year-Book*, 1904 R. 1906.

*1. Germanujo :*

| | |
|---|---|
| Armeo (sen pensioj kaj fondajo por invalidoj) | 870,070,000 fr. |
| Ŝiparo | 265,637,000 fr. |
| Ŝuldprocentoj | 157,532,000 fr. |
| Sume | 1,293,239,000 fr. |

*2. Aŭstrio-Hungarujo :*

| | |
|---|---|
| Armeo | 439,772,000 fr. |
| Ŝiparo | 53,822,000 fr. |
| Ŝuldprocentoj | 705,612,000 fr. |
| Sume | 1,199,206,000 fr. |

*3. Italujo :*

| | |
|---|---|
| Armeo | 278,661,000 fr. |
| Ŝiparo | 125,720,000 fr. |
| Ŝuldprocentoj (sen procentoj por fervojŝuldoj) | 644,339,000 fr. |
| Sume | 1,048,720,000 fr. |

**Sume por la Trialianco 3,541,165,000 fr.**

*4. Francujo :*

| | |
|---|---|
| Armeo | 708,233,000 fr. |
| Ŝiparo | 321,137,000 fr. |
| Ŝuldprocentoj | 1,206,562,000 fr. |
| Sume | 2,235,932,000 fr. |

*5. Rusujo :*

| | |
|---|---|
| Armeo | 1,440,600,000 fr. (1) |
| Ŝiparo | 460,949,000 fr. (1) |
| Ŝuldprocentoj | 1,197,528,000 fr. |
| Sume | 3,099,077,000 fr. |

**Sume por la Dualianco 5,335,009,000 fr.**

*6. Anglujo .*

| | |
|---|---|
| Armeo | 721,857,000 fr. |
| Ŝiparo | 909,701,000 fr. |
| Ŝuldprocentoj | 666,900,000 fr. |
| Sume | 2,298,458,000 fr. |

| | |
|---|---|
| Sume por la ses ĉefregnoj | 11,174,632,000 fr. |
| Nur por armeo kaj ŝuparo | 6,595,129,000 fr. |

Komparinte la elspezojn neproduktajn kun la proksimume kalkulita nacia enspezo ni trovas ke :

*Ĉe prokapa meza jarenspezo de :*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 420 fr., Germano | pagas | 21,55 fr. | t. e. | **5**,13 % |
| 319 fr., Aŭstriano | — | 26,60 fr. | t. e. | **8**,34 % |
| 249 fr., Italo | — | 31,13 fr. | t. e. | **12**,5 % |
| 605 fr., Franco | — | 57,48 fr. | t. e. | **9**,5 % |
| 206 fr., Ruso | — | 24,84 fr. | t. e. | **12**,06 % |
| 621 fr., Anglo | — | 51,71 fr. | t. e. | **8**,81 % |

(1) La rimarkinde altaj sumoj estas kaŭzitaj de la Orient-Azia milito.

1068-3-08. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

# ELDONOJ DE LA SOCIETO "PACIFISTO"

## I. ESPERO PACIFISTA

Monata organo de la Societo.

Jara abono : 5 frankoj. — Sin turni senpere al S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo). — (Escepte en okazo de kontraŭa deziro, la abonantoj estas enskribataj membroj de la Societo).

1-a jaro (1905), 300 dense presitaj paĝoj. fr. **5,00**

2-a jaro (1906), kun aldonoj, 442 paĝoj. fr **10,00**
(La numero 15—16-a ne estas plu liverebla aparte.)

3-a jaro (1907), 280 paĝoj. fr. **5,00**

## II. LIBRARO PACIFISMA

Por mendi, sin turni al la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Parizo.

La prezoj enhavas la sendelspezojn. Luksa eldono (malmultaj numeritaj ekzempleroj, sur papero el « alfo »), kostas duoblan prezon.

La verkoj de tiu kolekto povas esti klasifikataj kiel sekvas :

Generala Propagando : Numeroj 1, 3, 6, 7, 8, 14, 15.
Haltigo de l'Armadoj : 9, 10, 11, 12, 13, 14.
Ekonomio kaj Milito : 7.
Internaciaj Juro kaj Arbitracio : 1, 8, 14.
Historio : 1, 2, 4.
Literaturo : 5.

1. *Historio resuma de l'Arbitracio konstanta,* kun 6 grafikaĵoj, de **Gaston Moch.** fr. **0,30**

2. *Rememoro pri Solferino,* de **Henri Dunant,** traduko de Vaillant kaj Fruictier, kun portreto. **1,00**

*(Vidu daŭrigon sur la 4-a paĝo.)*

## Eldonoj de la Societo "Pacifisto"

*(Daŭrigo.)*

3. ***La Fundamentoj de l'Pacifismo,*** de **Elie Ducommun,** traduko de Victor Dufeutrel. **0,50**

4. ***Jarlibro de « Pacifisto »***, jaroj 1906 kaj 1907, po fr. **0,50**

5. ***Ili estis frenezaj,*** de **Octave Mirbeau** kaj ***Ruĝa Rido,*** de **Leonid Andrejev,** tradukoj de Louis Segretinat kaj Fjodor Avilov. **1,50**

6. ***Paco kaj milito,*** de profesoro **Charles Richet,** traduko de D-ro Vallienne. **0,75**

7. ***Estonta milito, laŭ la instruoj de Johano de Bloch,*** de **Frédéric Passy,** S-ino **de Suttner, P. Nattan-Larrier,** kapitano **Alesiano** kaj **Gaston Moch,** tradukoj de F-ino Royer, Fritz Schuck kaj Alesiano, kun portreto. **1,50**

8. ***Por Arbitracio,*** de **Andrew Carnegie,** kun antaŭparolo de senatano **d'Estournelles de Constant,** tradukoj de W. W. Padfield kaj Henri Maresquelle. **0,75**

9. ***Pri malarmo : Ĥimeroj kaj realaĵoj,*** de **Gaston Moch.** **0,25**

10. ***Limigo de l'Armadoj,*** de senatano **d'Estournelles de Constant,** trad. de Esselin, Filloux kaj Segrétinat. **0,75**

11. ***La Problemo de l'Malarmo,*** de **Hermann Fried,** tradukita de Alesiano. **0,50**

12. ***Por la Limigo de l'Armadoj,*** de **G. H. Perris,** traduko de Arthur A. Gray. *(En preparo).*

13. ***Formulo pri l'Malarmo,*** de **O. Umfrid,** traduko de Paul Christaller. **0,25**

14. ***Por la Dua Haga Konferenco***, enketo de l'**Internacia Instituto de Paco,** traduko de R. Laisney kaj Gaston Moch. **1,00**

15. ***Kio estas Nacio ?*** de **Ernest Renan,** traduko de Gaston Moch. *(En preparo).*